| Hejmtaskoj | |
|---|---|
| N-ro | Temo |
| 1 | ■ Prezentu vin kaj viajn familianojn!<br>Kiu kaj kio vi estas, kia vi estas, kion vi ŝatas. Same pri viaj parencoj – familianoj. |
| 2 | Ĝardeno<br>■ Kio kreskas en reĝa ĝardeno?<br>■ Kion oni povas planti en ĝardeno?<br>■ Ĉu vi havas ĝardenon?<br>■ Kia ĝi estas? Ĉu ĝi estas granda?<br>■ Kion vi plantas en via ĝardeno?<br>■ Kiu zorgas pri la ĝardeno? |
| 3 | Sporto kaj sportado.<br>■ Kiujn sportojn vi ŝatas?<br>■ Kiam vi sportas?<br>■ Kiujn sportojn ŝatas viaj geamikoj/parencoj?<br>■ Sportaj konkuroj, olimpikaj ludoj. |
| 4 | Sano kaj malsanoj.<br>■ Kiajn sanproblemojn havas (havis) vi kaj viaj geamikoj (parencoj)?<br>■ Ĉu vi ofte vizitadas kuraciston?<br>■ Kial oni povas rekomendi regulajn kontrolojn de sanstato?<br>■ Kormalsanoj, pulmomalsanoj. |
| 5 | Jarsezonoj, klimato, vetero, kalendaro.<br>■ Kiuj kaj kiaj estas jarsezonoj ĉe ni?<br>■ Kiujn jarsezonojn vi (ne)ŝatas kaj kial?<br>■ Kia klimato estas en diversaj lokoj de nia tero?<br>■ Kia vetero alternas ĉe ni?<br>■ Priskribu kalendaron (tagoj, semajnoj, monatoj, jarsezonoj). |
| 6 | Priskribu vian (aŭ familian) ferian ekskurson.<br>■ Kion vi pakis, kien vi ekskursis, kiel vi pasigis vian libertempon.<br>■ Kia estis vetero?<br>■ Ĉu vi praktikis iujn sportojn? |
| 7 | Grandmagazeno – aĉetadoj: nutraĵoj, vestaĵoj, ludiloj, industriaj varoj.<br>■ Ĉu vi ŝatas aĉetadi?<br>■ Kion vi ofte aĉetadas?<br>■ Ĉu vi aĉetadas modajn vestaĵojn?<br>■ Kun kiu vi kutime iras en magazenon, aŭ ĉu vi preferas aĉetadi sola? |
| 8 | Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, ilia preparo.<br>■ Kiujn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn vi preferas?<br>■ Kion vi ŝatas / scias kuiri?<br>■ Priskribu preparon de via ŝatata manĝaĵo! |
| 9 | Kie kaj kiel vi loĝas? Priskribu vian loĝejon!<br>■ Ĉu via loĝejo estas en paneldomo / en propra domo?<br>■ Kiom granda estas via loĝejo?<br>■ Kiuj ĉambroj / ejoj estas en via loĝejo?<br>■ Ĉu vi havas kelon / subtegmentejon / korton / ĝardenon / ludejon apud la domo? |
| 10 | Kion alportas por ni la teknika progreso?<br>■ Radio, televido<br>■ Aŭtomatigo<br>■ Komputiloj, interreto<br>■ Komunikado, poŝtelefonoj<br>■ Trafiko (kaj aliaj) |
| 11 | Vojaĝado, libertempo.<br>Kie kaj kiamaniere vi pasigis pasintjare aŭ volas nunjare pasigi vian libertempon? |
| 12 | Preparu por kolokvo:<br>Vidindaĵoj kaj memorindaĵoj en via loĝloko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.<br>Estu ĉiĉerono por via eksterlanda gasto. |